ilin senprepare, ĉar la melodioj pleje estas konataj al ĉiuj ĉeestantoj. Tamen, rigardante la kantaron pli zorgeme, la ne-anglo baldaŭ konstatos kun ĝojo, ke ĉi-volumeto en pluraj partoj sin turnas rekte al li. Nia kantemulo nun ĉasigas sian foliumadon en la ĵus ricevita kolekto kaj rigardas paĝon post paĝo de la komenco ĝis la fino. Kompreneble: la unua parto konsistas el Esperantaj kantoj kaj la unua el ili estas nia himno. Sur la tria paĝo la 7-a kaj 9-a kantoj altiras la atenton de nia kantemulo, kaj jen li jam ekzumas la unuajn vortojn de "Ĝesperantujo" laŭ la ario "Sankta Lucio." Kaj eĉ pli da kantoj li trovas, kiuj ne nur bonimpresas lin pro ilia poezia beleco, sed ankaŭ pro la fakto, ke li konas la melodion indikitan sub la titolo. "Bone," li pensas, "jen io, kion ni povas kanti en nia venonta grupkunveno." Li daŭrigas legeti paĝon post paĝo, kaj eĉ en la angla, irlanda, kimra kaj skota partoj li trovas kantojn konatajn al li. Ankaŭ en la parto de modernaj kantoj li renkontas kelkajn "internaciulojn," kiujn li salutas per aproba kapmovo. Bela li trovas la kolektojn de religiaj kaj plurvoĉaj kantoj, kies pleje klasikaj melodioj estas bone konataj al li. Koran ridon kaŭzas la humoraj kantoj, kaj nia amiko ekintencas nepre havigi al si la melodion por la kanto "La Kat' Revenis." Nun li atingis la parton "Operaj Kantoj." "Ĉu fakte!" li elvokas, kaj liaj okuloj sin ĵetas sur la tekstojn. Ne daŭras unu minuton ĝis kiam li ekkantas la Rigolettaĵon "Facilanimaj estas virinoj. . . ." Nia kantema samideano kvazaŭ entuziasmiĝas, kaj trovante en la lasta parto de diversaj kantoj eĉ la belegan "Adelaida," li ne plu povas teni sin: "Anjo!" li vokas sian edzinon, "venu ja minuton kaj kantu tiujn Esperantajn vortojn dum mi akompanas vin sur la piano!" Kaj jen la mirinde bela kanto eksonas en la lerta Esperanta traduko.— "Anjo," nia kantema samideano diras post la fino al sia edzino, "Anjo, mi rekomendos tiun belan kantaron al la anoj de nia grupo."

Ph. H. Hahn.

Biblioteko Tutmonda No. 10. Rudolf Mosse, Berlin, 63 pages.

A collection of six stories written by I. Al. Bratescu-Voinesti and translated from the Rumanian language by T. Morariu. The author is one of the prominent writers of fiction in Rumania. His most popular works are "Mallumo kaj Lumo," "En la Mondo de l' Vero" and "En la Servo de l' Paco." His writings are deeply psychological and while somber even to sadness they contain a moral and not without the power of holding the interest of the reader. The stories in Vol. 10 are: "Niĉjo Mensogulo," "Al vojaĝanto decas vojiro," "La Ideto" (charming fable), "La peltó de Isaja," "Niketo," "La najtingalo."

As usual in this series of books, now being published by Rudolf Mosse, it is in clear type and in every way attractive. The

translation is at times somewhat out of the ordinary, and probably because of a desire to retain the style of the author, but this does not lessen the high quality of the translation.

(This completes the first series, which we can supply at \$1.25 for the set.)

Karaktero, de J. M. Van Stipriaan Luisius, 32 pages, translated by H. J. Bulthuis, L. K. Published by Akcia Societo, Hago, Holando.

The author is an eminent lawyer in Hago. In few words as an introduction he says: "Ĝi estas malĝojiga vero, ke el mil homoj nur cent scias, kio estas karaktero, nur dek havas karakteron, kaj nur unu havas bonan karakteron. Tamen estas pli necesa ol pano, kaj la homoj kun bona karaktero formas la fundamentojn de la socio. Tial mi deziras prirespondi la sekvantajn demandojn: (1) Kio estas karaktero? (2) Kiel oni formas karakteron? (3) El kio konsistas bona karaktero?"

The treatment is an exhaustive study of the subject and includes thirty points for discussion, each not only interesting and convincing but also instructive. Space will not permit our giving all the titles to the various topics learnedly treated by the author; they include: Bonvoleco, Ĝentileco, Modesteco, Takto, Precizeco, Kuraĝo, Justeco, Amo al patrujo, Amo al paco, Honesteco, Plenumo de promesoj, Spiritforteco, and others of vital importance. It would be well for all our readers to give careful study and serious consideration to the teachings as given in this important study of character; a book that ought to be read and pondered by the young whose characters are in a state of formation.

As to the translation, no higher praise need be given than to say that it was done by the eminent translator and author H. J. Bulthuis, whose many works and knowledge of languages and their formation have caused his name to be included among those comprising the L. K. Mr. Bulthuis is a skilful writer of Esperanto and all of his donations to the Esperanto world are well worthy of consideration, and also of close study.

E. S. P.

KION DANZIG HAVAS

Kiel okazigi Universalan Kongreson de Esperanto en via urbo
Martha L. Root

En la Bahai Revuo, "Star of the West," Aprilo, 1927.

Tradukis Esperanten G. W. Lee

Danzig, "la Reĝino de la Balta Maro," urbo de dolĉaj sonoril-aroj, de freŝaj marventoj blovetantaj, kaj mezepoka ĉarmo de

ĝoje koloritaj stratoj, malnovaj pordegoj kaj antikvaj preĝejoj, havas trezoron kiun ĉiu urbo en la mondo povus alaspiri. Ne unu el la plej grandaj landoj povas fanfaroni ke ĝi havas ties similiajn. Tiu ĉi juvelo estas kara virineto, S-ino Anna Tuschinski, okdekkvinjare "juna," kiu estas la pioniro de Esperanto en la "Libera" Civito Danzig.

Vidvinigite, kiam ŝi havis kvardek naŭ jarojn, ŝi fariĝis instruisto de lingvoj. Unu tagon, tute laŭ ŝanco, dum sia sesdek-sesa jaro, ŝi ektrovis malgrandan Esperantan gramatikon. Ŝi ellegis ĝin kaj tuj rimarkis kiel logika ĝi estas. Ŝi lernis tiun ĉi universalan helplingvon, kunvenigis la gejunulojn, instruis ilin, kaj baldaŭ ŝi havis grandan vesperan akceptadon, al kiu ŝi invitis la Danzigajn civitanojn. Je la unua fojo ili aŭdis Esperanton kaj pri Esperanto.

La pruvoj de ŝiaj dudek jaroj de neĉesa laboro kaj ŝia bonega Esperanto estas: unua, ŝia civito, Danzig, kaptis la honoron havi la Deknaŭan Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazos tie julion 28 ĝis aŭgusto 4. Dua pruvo estas, ke iuj el la plej inteligentaj, kulturitaj junuloj de Danzig, estas fervoraj Esperantistoj. F-ino Kaethe Marquardt, privata sekretario al la Prezidanto, estas rimarkinda Esperantisto. La Prezidanto, D-ro Heinrich Sahn, estas la Patrono de tiu ĉi venonta Universala Kongreso de Esperanto. La Ĉefa Delegito, S-ro Bernhard Aeltermann, estas en la oficejo de la Civita (Ŝtata) registaro, kaj estas Urbestro de la malgranda civito, Emaus, kiu estas apuda al Danzig.

Kiel ĉio ĉi okazis? Dolĉa S-ino Tuschinski ne estas alta, silenta, timega; kontraŭe, ŝi estas tre malgranda, maldika, ĉiam ridetanta, riĉe benita per la humoreco; kaj tiel malpeza estas ŝia paŝo, ke ŝi ankoraŭ dancadas kun la junuloj ĉe la Esperantistaj baloj kaj neformalaj festoj. La skribanto informiĝis de la lernantoj, ke ilia instruisto neniam hezitas supreniri tri kaj kvar ŝtuparojn por viziti la malsanajn Esperantistojn, aŭ, pli ofte, la tre malriĉajn. Iuj diras, ke ŝi estas tre malsaĝa, pro tio, ke ŝi elspezis ĉion pro aliaj; sed ŝi diris al la skribanto: "Mi estas pli riĉa ol iu el ili, ĉar miajn korposedaĵojn neniu povas forkapti."

Anna Tuschinski, senkonscie instruadas al Danzig kaj instruos al ĉiuj vizitantoj ion, eĉ pli perfektan ol perfekta Esperanto: tio estas la mirinda sekreto de feliĉeco! Ŝi posedas altan spiritan celon, kiu donas la ĝojon al la vivo; plenigita je amo kaj servemo, ŝi estas ĉiam ĉirkaŭata de amo kaj amikoj.

Kiam la skribanto de tiu ĉi skizo parolis al ŝi pri du Bahai-aj kunsidoj kiel parto de tiu ĉi venonta Kongreso, ŝi rapide respondis: "Jes, mi venos al viaj du Bahai-aj kunsidoj kaj al la Katolika dimanĉa diservo kaj al la Juda kunveno. Mi amas ĉiajn noblajn personojn. Ni devas transiri la mallarĝan ponton

de malsamaĵoj religiaj. Mi fariĝis Esperantisto por transiri la ponton de lingvaj malsamaĵoj. Vi estas la unua Baha'i, kiun mi ĝis nun renkontis, sed tre ofte mi legis pri la Principoj de Baha' u'llah en la Esperantaj gazetoj."

La tritaga vizito al Danzig okazis en marto, speciale por priaranĝi ĉiajn detalojn por tiuj ĉi du gravaj Baha'i kunsidoj. La ĝenerala temo por la kunsido de julio 30, estas: "Baha'i Principoj por la Nova Universala Eduko"; la temo por la kunsido je aŭgusto la unua estas: "La Baha'i Pruvoj de la Vivo post la Morto." Kompreneble, la Universala Kongreso de Esperanto estas neŭtrala en religio kaj politiko, sed "Fakaj Kunvenoj," kiel tiuj ĉi diversaj kunsidoj estas nomitaj, povas esti aranĝitaj de membroj de diversaj religiaj organizoj, pacaj societoj, sciencaj societoj, laboristaj partioj, kaj aliaj; kaj ĉiujn Kongresajn partoprenantojn oni povas inviti. Kvindek organizoj internaciaj havos reprezentantojn ĉe tiu ĉi Kongreso.

Danzig faras preparojn por 2,500 vizitantoj dum Kongresa semajno. Pli ol 500 estas atendataj el Germanujo. Polaj Esperantistoj skribas, ke pli ol 300 venos el iliaj urboj; Grandbritujo havos grandan reprezentaron. Preskaŭ ĉiu lando en la mondo sendas delegitojn. Ĉar Danzig estas centra en Eŭropo, multcentoj povas ĉeesti. La Somera Universitato en Esperanto logadas multajn, kaj ankaŭ, ĉar tiu ĉi estas Jubilea Jaro en Esperanto, multaj ĉeestos la solenan kaj impresivan feston, kiu estos parto de la Kongresa programo.

Estos multaj aliaj aferoj. Unutage, ĉiuj la Kongresanoj estos kondukataj ekskurse sur la Balta Maro. Alitage, vespere, Grandopera prezento de "Gotterdammerung" estos en bela arbaro de pinoj kaj betuloj en Zoppot, fama apudmara civito proksima de Danzig (nur dudek minutojn per la rapida vagonaro). Tricent muzikistoj venos de Berlin, Vieno, Dresden, kaj Munich, por kanti en tiu ĉi opero. La Esperanto Oratora Konkurso okazos en Zoppot, en granda ĝardeno de unu el la hoteloj rigardantaj el supre la Baltan Maron. Poste, oni servos teon, la centoj da tabloj aranĝataj tiel ke ĉiuj povas vidi la belan Baltan kaj aŭdi ĝian murmuron.

La kara "Esperantista patrineto," okdekkvinjara, S-ino Anna Tuschinski, vivu vidi tiun ĉi Kongreson kaj la Esperantistoj vidu ŝin!

BONVENIGO DE L' PUPOJ EL USONO

Ofte estis raportitaj en preskaŭ ĉiuj tagjurnaloj pri la bonvenigo de l' pupoj alvenintaj de tempo al tempo donacite de usonaj knabinoj al japanaj.

Ili estas disdonitaj al infanĝardenoj, elementaj lernejoj, vir-

inaj lernejoj, k.t.p. tra la lando, kaj ĉie oni varme aranĝas grandiozan bonvenigon por ili.

Ĉar la 3-a de marto estas la festotago por pupoj estas nature, ke speciale granda sensacio estas kaŭzita en tiu ĉi okazo.

Nia urbo Ŝizuoka ankaŭ ricevinte pli ol 100 el ili, oni ekspoziciis dum semajno kaj poste okazigis la 19-an akceptan kunsidon sub la ĉeesto de la lokaj eminentuloj kaj la loĝantoj usonaj en la urbo.

Reprezentis infanino Ruth Stetson kaj infano Sholty la donacantojn kaj infanino F. Nagai kaj infano H. Macumoto la donacatojn, kaj la ceremonio finiĝis per la ĥoro de la bonveniga kanto.

Jen alia raporto:—

La transigo de la bluokulaj pupoj okazis posttagmeze la 18-an en vaporsipo Tenjoo-maru ĉe la nova kajo de Jokohama haveno.

Estis vicigitaj antaŭ la fortepiano en la socia halo ornamita per diversnaciaj flagetoj ĉarma f-ino Amerika kaj plujaj 48 pupoj reprezentantaj la 48 ŝtatojn usonajn.

Ĉeestis S-ro Sekija, estro de ĝenerala kleriga fako de la edukada departmento, S-ro Kemper, usona konsulo-generalo, Prof. Fisher de Kantoo lernejo, lia filino Betsy, 12-jara, Hacunjo Ikeda 10-jara, filino de la gubernatoro, Sadanjo Arijoŝi 10-jara, filino de la urbestro, kaj plujaj infaninoj el la urbo, entute 49.

Estis ja rava sceno, ke tiuj ĉarmaj infaninoj vicigis sin el la salono portante "Furisode" (longmanika vestaĵo) el blindige ellaborita krepo.

Betsy parolis: "Elkore mi ĝojas enmanigi al vi, japanaj amikinoj, f-inon Amerika kaj plujajn pupojn reprezentantajn la 48 ŝtatojn niajn."

Responde al tio diris Hacunjo: "Korege mi dankas vin, usonaj amikinoj, en la nomo de japanaj infaninoj."

Poste enmanigis S-ro Kemper f-inon Amerika al S-ro Sekija, kaj tiu ĉi al Hacunjo.

La dua estis f-ino Nov-Jorko, kiun ricevis la dua infanino, kaj fine ĉiu el la 49 infaninoj ĉirkaŭprenis po unu de la bluokulaj pupoj.

Kiam ili elŝipiĝis ĉe la kajo, atendis tie 3,000 geinfanoj, kaj dum ilia aplaŭdo 49 aŭtomobiloj sin turnis al la bonvenigejo antaŭaranĝita en Hommoku lernejo, kie estis atendintaj S-ro Arijoŝi, urbestro, kaj aliaj eminentuloj.

Eksonis tie la naciaj kantoj de ambaŭ landoj kaj bonveniga kanto al la pupoj el inter la amaso da infaninoj, poste parolis la urbestro kaj sekve la konsulo-generalo, kaj finiĝis la kunsido.

K. Takahaŝ,

Ŝizuoka, Japanujo.

La 19-an de Marto, 1927.

Tokio, Japanujo.

Tre estimataj sinjoroj,

Mi estas nova 23-jara lernanto en Tokio, Japanujo. Mi ekscias, ke la korespondado kun fremdlandaj samideanoj estas unu el la bonaj metodoj lerni esperantan lingvon, tial mi permesas al mi peti vin, ke vi bonvole havu bonecon amikigi min al via anaro kun kelkaj junaj tiaj, kiuj havas guston por kinemaĵo kaj teatraĵo ĉar mi pli-malpli interesiĝas je tio.

Samideane via,

Mr. K. Okada, % Nishinomiya
Honten, Kanda, Nishi-imagawacho 7,
Tokio, Japanlando.

TRIOBLA NECESAJO DE LA HOMARO

Al scienco, kiel al religio, apartenas vere mirakloj. Kaj ni ja estas vivantaj nuntempe en epoko de mirakloj. Se niaj praavoj povus reveni al tero, kiajn mirindaĵojn ili rigardus! Senĉevalajn veturilojn kuradantajn kaj rekuradantajn; voĉojn aŭdatajn per la telefono cent mejlojn malproksime; koncertojn forsenditajn ok mil mejloj kaj plu, per radio.

Ĉiuj ĉi kunmetas "Monumenton No. I" al nia nuntempa epoko. Tamen estas alia "Monumento," kiun ni nomu "No. II." Ĝi ne estas tiel komplimenta kiel No. I. Ne, ĉar ĝi estas nia monumenta malspriteco. Kio! Tiu ĉi scienca periodo kulpa pri malspriteco? Jes, vere, kaj tio en la plej grava fako de homaraj intereso. Nia Malspriteco troviĝas en nia maltrafo detruiri la unu radikon de malriĉeco kaj milito, kune kun ĉiuj iliaj teruraj fruktoj.

Kia rimedo mankas por nia kompatinda mondo? Nepre unu triobla kuracilo:—

- I. Klara Celo.
- II. Saĝa Progreso.
- III. Pova Ĉefo.

I. KLARA CELO

Per unu vorto, ni rekomendas interesan libron kiu pentras la mondon fariĝi en la jaro 2000. Ĝia nomo estas "Posten Rigardante" (angle, "Looking Backward"). La verkanto estis Edward Bellamy, el Boston, Usono. Tiu ĉi libro estas tradukita en multajn lingvojn kaj legita de homamasoj—treege admirata sed ne ankoraŭ plenumata. Se vi estas ĝin leginta, legu ĝin ree. Ĝi elmontras mondon sen moneraro sed uzantan registarajn biletojn.

Ĉiu viro laboras, necese kaj volonte, por la ŝtato. En tiu epoko estas nek malriĉeco nek riĉegeco. Ĉiuj personoj kaj familioj estas komfortaj kaj feliĉaj. Tiu bonstato estas la triumfo de justeco kaj prudento.

II. SAĜA PROGRESADO

Kapitalismo progresada kondukas al tiu ĉi celo. Ni vidas grandajn korporaciojn kuniĝantaj; pli kaj pli la malgrandaj estas englutataj de la grandaj. Tiu ĉi procedo devas esti kuraĝigata kaj akcelata ĝis ĉiuj korporacioj fariĝos unu—unu grandega korporacio posedata de la tuta popolo kaj demokrate administrata.

III. POVA ĈEFO

Granda vekigo incitas la naciojn. Precipe en Azio tiu estas vidata. Rasoj nomataj "Malkredantaj" de la Kristanoj nun alvenas al la spirito kaj principoj de Kristo. Kaj tio ankaŭ ne tute per la eklezio, sed per studo kaj meditado. "Kristo Nia Kondukisto" estas la Kredo de tiu ĉi granda vekigo.

Tial, kiam la mondo klare vidos sian celon, sian progresadan devon kaj sian povan Savanton, la homaro fariĝos unu frateca familio sub la Eterna Patro.

James M. Smiley.

APLIKO DE ESPERANTO AL KOOPERATIVA MOVADO

Ĉe Moskva Kooperativa Klubo estis organizita "Esperanta Sekcio" celanta akiri pere de Esperanto materialon pri kooperativa movado eksterlande en diversaj ĝiaj branĉoj kiel ekzemple: (1) negoco, (2) strukturo de administra kaj komerca aparato, (3) komuna nutrado, (4) domkonstruado, (5) provizado, konservado kaj deponado de ledo k. a. krudaĵo k.t.p., k.t.p.

La "Sekcio" esperas, ke gesamideanoj tutmondaj helpos ĝin per alsendo de siaj adresoj ĉu per livero de dezirataj informoj senpere aŭ pere de siaj naciaj kooperativaj organizaĵoj.

La sendota materialo estos prilaborata kaj uzata en celoj de tutmonda kooperativa movado. Rezultoj de ĉi tiu laboro estos publikitaj kaj laŭ deziro riceveblaj de la sekcio.

Gesamideanoj memoru, ke via helpo en ĉi tiu afero pruvos praktikan utilon de Esperanto, kaj samtempe helpos al disvastiĝo de Esperanto kaj de kooperacio.

Gesamideanoj ne prokrastu skribi. Vian leteron ni atendas. Ĉiuj poŝtelspezoj laŭ deziro estos rekompensataj. La respondo estas garantita.

La korespondajon adresu jene:

Centra Kooperativa Klubo, Esperanta Sekcio, Neglinnaaj 29, Moskvo, U. S. S. R.

REGADO DE MIAJ PENSOJ

La plej taŭga tempo por la pensa kunigo(1) estas la tempo antaŭ la ekdormo(2), post kiam ni estingis(3) lampon, kaj se eble apud la fenestro. Dum malrapida leviĝado(4) sur piedfingroj, kaj samtempe dum longa, profunda enspiro ni malrapide dismetas ambaŭflanke la brakojn. Kiam la enspiro finiĝis(5) ni tenas la manojn suprenlevitajn kaj la aeron en pulmo tiel longe, kiel eble. Post tio dum malrapida stariĝado(6) sur kalkanoj ni finas la elspiron(7) ĝis plena malpleniĝo(8) de la pulmo. Tion ĉi ni ripetas sepfoje. Ĉe la sepa fojo ni tenas la manojn duon-arke(9) dismetitajn kun manplatoj supren(10) turnitaj kaj ni portas ilin en tiu pozo antaŭ nin(11). Poste ni lasas la kubutojn malleviĝi al la korpo kvazaŭ ni tenus(12) malfermitan libron. Ne parolante, sole per la koncentrita penso ni esprimas la deziron de(13) daŭraj(14) paco, bonstato kaj feliĉo por ni mem kaj por tuta kreitaĵaro, precipe por ĉiuj, kun kiuj ligas nin en la tuta mondo la sama penso. Ni penas elsendadi la plej sincerajn dezirojn de bono por ĉiuj kiel eble plej(15) fervore, plej pie, plej arde. En tiu koncentrado ni restas ĝis plena laciĝo(16) dum malrapida, profunda spirado. Laciĝintaj manoj iras malsupren(17) sur la korpo(18) kaj post tio ni ripoze kunmetas la manojn sur la dorso(19) al la kubutoj tiel, ke venas manplato dekstra al kubuto maldekstra. Post tio ni lasas dum la plej granda kvieto efiki(20) ĉiujn bonajn pensojn, kiujn niaj pli feliĉaj amikoj el la tuta mondo en la sama momento elsendas — kaj ni helpas(21) ke ili povu kuniĝi kun ĉiuj niaj sopiroj. Poste ni enlitiĝas(22).

Statement of Ownership, Management, Circulation, etc., required by the Act of Congress of August 24, 1912, of Amerika Esperantisto, published at Boston, Mass., as of October 1, 1926.

Publisher, The Esperanto Association of North America, Inc.

Editors: Herbert M. Scott and the Publications Committee, G. Winthrop Lee and Ernest F. Dow.

Owners, The Esperanto Association of North America, Inc. Henry W. Hetzel, President, Philadelphia, Pa.; Raymond T. Bye, Vice President, Moylan, Pa.; Treasurer, Miss A. C. Leavitt, Washington, D. C.; Secretary, Miss E. J. Meriam, Boston, Mass. No Bonds or Mortgages.

(signed) E. J. Meriam, Secretary.

Sworn to and subscribed before me this 10th day of October, 1926.

Hazel C. Smith, Notary Public.

My commission expires January 21, 1927.

Notes: Causative *ig* and *iĝ* are well illustrated in this paragraph. (1) *kunigo* is a good example of making words out of prefixes and suffixes, which we can thus understand without using a dictionary (causing with = uniting); (4) *leviĝado* (a causing to rise up); (5) *finiĝis* (caused itself; became finished); (6) *stariĝado* (became standing); (8) *malplenigo* (a causing to be empty); (16) *laciĝo* (a becoming tired); (22) *enlitiĝas* (become in bed). (2) *Ekdormo* shows how *ek* denotes suddenness (a wake up). (3) *Estingis* shows the use of the past tense when in English we should use the perfect (have—rather than simply extinguished; Esperanto thus showing the tense uses by peoples of other languages). (7) *Elspiron*, sufficient for exhaling (instead of *elspirado*, which would also be correct), illustrating the principle of sufficiency, of not making the language too heavy. (9) *duonarko*, a good illustration of the predicate nominative as used by what seems to be an invention of Dr. Zamenhof, without an exact parallel in any other natural language. (8) *korpo* and (19) *dorso* are nominatives after *sur*, which might have been followed by accusatives without any appreciable change of meaning. (10) *supren*, an accusative adverb and probably an invention of Dr. Zamenhof's, which serves a very useful purpose. (11) *ni*, the accusative, which has little shade of meaning different from what *ni* would mean. (17) *malsupren* (see 10), easier to appreciate than such an expression as *li iris renkonten al ni*. (Difficult to parse *renkonten? ĉu ne?*). (12) *tenus*, should hold or had held—the subjunctive in Esperanto, like the past indicative (3) having a twofold sense, which like the predicate nominative (9) the grammars do not seem to have dwelt on much. (20) *helpas ke...* (wherein the author, like plenty of us, seems to have let his native idiom get the better of him. But we can see what he means). (20) *efiki* (to be efficacious) not to be confused with *efektivigi* (to cause to have an effect).

FONDIĜO DE LA ESPERANTO-SEKCIO DE PANEŬROPO-UNIO EN WIEN

La 12-an de Februaro okazis en Wien la fondanta kunveno de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropo-Unio. Direktoro Kronberger malfermis la kunvenon kaj salutis le ĉeestantojn. D-ro Sos estis unuanime elektata kiel gvidanto de la Esperanto Sekcio. D-ro Sos dankis por la elekto, raportis pri la ĝisnuna propaganda agado de la esperantistoj por la Paneŭropa movado kaj esperis, ke per la fondiĝo de la Esperanto-Sekcio ĉiuj esperantistoj sin unuigos por subtenado de la Paneŭropa movado. Post li referatis profesoro D-ro Jokl pri la Ŝtatkrea potenco de la lingvo kaj

deduktis el tio la graveon de la Esperanto-lingvo, kiu devenas el diversaj eŭropaj lingvoj, por la Paneŭropa movado.

Direktoro Kronberger evoluis la organizacian planon de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropa-Unio kaj voĉlegis la organizaĵajn decidojn de la ĉefkomizio de la I-a Paneŭropo-Kongreso, kiuj estu, same kiel por ĉiuj aliaj Paneŭropaj organizacioj, la fundamento ankaŭ de la Esperanto-Sekcio.

La kunveno decidis, interkomuniki sin kun la Esperanto-asocioj en Eŭropo kaj uzi Esperanton kiel korespondan lingvon.

La centro de la Esperanto-Sekcio de Paneŭropa-Unio (E. S. P. U.) estas en Wien, I. Hofburg, kien oni sendu aliĝ-anoncojn kaj ĉiujn korespondaĵojn. Jara kotizo de membroj: aŭ. S 3.— (2½ sv. Fr.).

La 19 de Novembro, ĉe la kunveno de la Grupo pariza, en la Sorbonne, S-ro Profesoro Cart, Prezidanto de la Esperantista Akademio, ripetis la interesan paroladon, kiun li faris kun granda sukceso ĉe la XVIII-a Kongreso, en Edinburgo, pri popola poezio en Francujo, kun deklamoj kaj kantoj.

El tiu parolado ni reproduktas la jenan eltiradon kaj pecon kantitan.

LA TRI TAMBURISTOJ

| | |
|--|--|
| <p>I Tamburistoj, tri, Promenas en la urbo Ra, ra, ra, ta pla Promenas en la urbo.</p> | <p>VIII La Reĝo: Ne ĝentila tamburisto Vi estas ne sufiĉe riĉa....</p> |
| <p>II La filino de l' reĝo Venis ĉe l' fenestro Ra, ra, ra, ta pla Ĉe le fenestro jen staras ŝi.</p> | <p>IX La Tamburisto: Via reĝa Moŝto Nur tro riĉa mi estas....</p> |
| <p>III Unu el la tri Tenis rozon en mano....</p> | <p>X Tri ŝipojn mi posedas Sur maro la granda....</p> |
| <p>IV La Reĝidino: Ĉarma tamburisto Donu rozon ĉi tiun....</p> | <p>XI Unu plenan je arĝento La alian je multvaloraj ŝtonoj..</p> |
| <p>V La Tamburisto: Ho filino de l' reĝo Ĉu vi estas mia amikino?....</p> | <p>XII La trian plenan je oro Por promenigi mian amikinson.</p> |
| <p>VI Ŝi: Ĉarma tamburisto Demandu mian patron!....</p> | <p>XIII La Reĝo: Ho ĝentila tamburisto Ŝin prenu, al vi mi donas ŝin..</p> |
| <p>VII La Tamburisto (al la Reĝo) Via reĝo Moŝto Al mi donu vian filinon!....</p> | <p>XIV La Tamburisto: Via reĝa Moŝto, mi dankas. En mia lando, pli belaj estas ja!</p> |

—La Movado, Dec. 1926.

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT — A CLASS THEN AND THERE
 BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE

Drop us a postcard for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

A FEW OUTSTANDING BOOKS ON SALE AT
 THE CENTRAL OFFICE

Esperanto Translations by

Edward S. Payson, Hon. President E. A. N. A.

| | |
|---|--------|
| MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito Dr. J. U. Gisey | \$.35 |
| LA ROZUJO CIUMILJARA Mabel Wagnalls | \$.35 |
| MISERERE Mabel Wagnalls | \$.50 |
| THAIS Anatole France | |
| LA AKROBATO DE NIA SINJORINO (Aŭtoro Nekonata) | \$.35 |
| BLANCHE, La Virgulino de Lille Ossip Schubin | \$.35 |
| LA KARTO MISTERA Cleveland Moffett | \$.35 |

THE COMPLETE BIBLE
 IN ESPERANTO

| | | | |
|--|--------|------------------------------------|------|
| 1. Art Vellum, Ordinary paper | \$1.75 | 4. Yapp, leather lining, India pa- | |
| 2. Art Vellum, India paper, gilt top | 2.50 | per, gilt top | 5.50 |
| 3. Persian Morocco, India paper, gilt top | 3.50 | | |

THE ESPERANTO ASSOCIATION
 OF NORTH AMERICA, Inc.
 507 Pierce Building, Copley Square
 BOSTON, MASS.

Save Money on Your
 PERIODICAL SUBSCRIPTIONS

Lowest Club Rates on Your List.

We make a Specialty of furnishing
 Magazines of all kinds wherever pub-
 lished, to subscribers anywhere.

Send us your Magazine orders for
 Quotation

THE PALMER CO.

120 Boylston St. Boston, Mass.

GO TO DANZIG

(19th Universal Esperanto Congress)
 with the

ESPERANTO TRAVEL CLUB

Learn Esperanto while you travel.

| | |
|-------------------|--|
| July 5, New York | } Round Trip \$195 Tourist Cabin |
| July 17, Danzig | |
| Aug. 13, Danzig | |
| Aug. 25, New York | |

Guide and Teacher: F. A. HAMANN,
 Propagandestro de E. A. N. A.
 481—63rd St. Wauwatosa, Wis.

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

STUDY ESPERANTO



ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language

Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,
Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY

By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA

and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)

The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies